Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 28 novembro – 1 decembro**

# La Flamo de Esperanto

**27-a de novembro 2024, numero 1**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Ni transprenas la torĉon kaj portas *La Flamon de Esperanto*

★ Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova



Karaj legantoj, jen venas la 5-a virtuala kongreso de Esperanto. Ni, esperantistoj, memoros la jaron 2024, kiel la jaron, kiam okazis la unua Universala Kongreso en Afriko. Malgraŭ ĉiuj defioj, malgraŭ ĉiuj hezitoj, ĝi okazis sukcese.

*La Voĉo de Kilimanĝaro*, kiun brile redaktis Adjévi Adjé, estis la Kongresa Kuriero dum la ĉi-jara UK. Estas granda honoro transpreni de li la torĉon, kaj porti *La Flamon de Esperanto*, la flamon de la Espero el Afriko al la tuta mondo.

### La 5-a virtuala kongreso

Jam kvinan fojon la virtuala kongreso por kelkaj tagoj donas eblon ĝui Esperantujon, ne lasante sian hejmon. Ni ĉiuj esperas, ke la 5-a VK estos same bunta, kiel tradicie buntaj estas ĉiuj VK. Vi, homoj el dekoj da landoj, faras ĝin tia per viaj kontribuoj, via partopreno, viaj demandoj kaj komentoj, viaj paroloj en babilejoj. Ne forgesu, ni ĉiuj faras la VK kune! Kaj ne hezitu sendi viajn impresojn al ni! Ni ĝojus publikigi en *La Flamo de Esperanto* viajn anoncojn kaj raportojn, viajn opiniojn, dumkongresajn kuriozaĵojn, eĉ bone kaptitajn de vi ekranfotojn!

Kia estos la virtuala kongreso ĉi-jare? Ni unuavice atendas de ĝi Esperantan etoson, etoson de amikeco, interkompreno, estimo kaj... scivolemo. Ni ja renkontiĝas ne (almenaŭ ne nur) por distri, sed por ekkoni kaj rakonti ion novan. Ni atendas ankaŭ belajn sciencajn kaj primovadajn prelegojn, diskutojn kaj virtualajn ekskursojn al la foraj partoj de nia planedo. Ni atendas kulturan programon kaj liberajn babiladojn. Kaj kion atendas vi, karaj?

*La Flamo de Esperanto* kaj aliaj kanaloj (kiel Telegrama grupo, paĝoj en la sociaj retoj, Gazetaraj Komunikoj de UEA ka.) akompanos vin dum la kongreso kaj ankaŭ post ĝi.

*La Flamo de Esperanto*, same kiel la pasintjaraj kurieroj, estas senpage elŝutebla. Vi rajtas libere disvastigi ĝin en sociaj retoj, lokaj kaj fakaj dissendolistoj kaj simple resendi al viaj Esperantaj amikoj.


**Ĝis la baldaŭa revido!**
**Ni ĝuu la kongreson kune!**

---

**Dum la 109-a UK aperis *La Voĉo de Kilimanĝaro*, kiun redaktis Adjévi Adjé. Ĉiujn 7 numerojn de la Kongresa Kuriero vi daŭre povas libere elŝuti en la retejo: https://uk.esperanto.net/2024**



# La scienca programo de la UK (kaj pli) spekteblas ankaŭ dum la VK



★ Amri Wandel

Bona novaĵo por tiuj kiuj ne povis spekti la sciencajn prelegojn en Tanzanio. Preskaŭ ĉiuj okazos ankaŭ dum la VK, kaj pluraj prelegantoj respondos demandojn vive. Okazos ankaŭ du interesaj programeroj, kiuj ne okazis en la UK: KonSciU kaj Faka Forumo.



Ĵaŭde, post la VK-malfermo, je la 13:00-14:30 UTC, okazos la dua KonSciU: konkurso por junaj esploristoj kaj studentoj. La partoprenantoj prezentos dum po tri minutoj sian esploron aŭ analizon, kiu estos prijuĝita de kompetenta ĵurio.

Tuj poste, inter la 15:00-16:30 UTC, bonvenigos vin la inaŭguro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj ĝia unua prelego: "Astrofiziko por laikoj" de Amri Wandel. Ĉi-foje sen AIS-ekzameno, sed kun abunda tempo por demandoj de la publiko. Tuj poste (17:00 UTC) rekomendindas (ekster IKU) prelego pri kvantuma fiziko.

Vendrede, inter la 17:00-18:00 UTC, unuafoje post Torino, okazos la Faka Forumo, kie Fakaj Asocioj povos prezenti sin kaj partopreni publikan diskuton: kiel revivigi la fakan agadon en Esperantujo? Bonvenas ankaŭ unuopuloj kaj reprezentantoj de Fakaj Asocioj kiuj ne anticipe registriĝis. Vendrede je la 23-a UTC prelegos (registrite) Jacobsen pri la Mpenda efiko.

En la lastaj du tagoj sekvos la aliaj IKU-prelegoj, okazintaj dum la UK (vidu iliajn resumojn en *https://uea.org/teko/IKU/2024*): sabate: Lagrange (*Stefan Zweig*) kaj Fontaine (*Terapio per Lasero*); dimanĉe: Gruner (*la Berlina Kongreso pri Afriko*), Raola (*Fosilia datado*) kaj Zieba (Afrika Filozofio).


## IKU-Libro 2024 estas akirebla en la libroservo de UEA!

Universala Esperanto-Asocio
Internacia Kongresa Universitato
77-a sesio
109-a Universala Kongreso de Esperanto

★

Aruso, Tanzanio. 3 — 10 de aŭgusto 2024
Scienca Universitata Sesio
40-a sesio
Eŭropa Kongreso de Esperanto
Strasburgo, Francio. 11 — 12 de majo 2024




**La libron eblas mendi ĉi-tie:**
**https://mallonge.net/1hm**

# Okazis Esperanto-Kurso ĉe Kotesar Multfaka Kolegio, Jadibuti, Katmanduo

★ Bharat Kumar Ghimire,
Prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio

La Departemento pri Kampara Disvolviĝo (Fakultato de Kampara Disvolviĝo, Sociologio kaj Amaskomunikado) organizis 20-horan kurson pri Esperanto. Ĉi tiu projekto estas oficiale subtenata de Kotesar Multfaka Kolegio.




Okazis la solena inaŭguro de la kurso. S-ro Manoj Adhikari, la ĉefo de la departemento, bonvenigis la ĉeestantojn. Kiel la ĉefa gasto de la evento, S-ro Govinda Bahadur Karki, la ĉefo de la kolegio, parolis pri la graveco de Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo kaj pri ĝia historio. Prof. D-ro Bharat Kumar Upadhaya, sekretario de Nepala Esperanto-Asocio, prezentis inspirplenan prelegon pri Zamenhof, kuraĝigante la studentojn pli profunde esplori la lingvon.

La instruisto de Esperanto, Bharat Kumar Ghimire (asista profesoro de la sama kolegio), klarigis la bazojn de la lingvo kaj respondis diversajn demandojn de la partoprenantoj. La programo estis gvidata de S-ro Padam Raj Joshi, ankaŭ asista profesoro de la kolegio. Post la inaŭguro, okazis la unua leciono de la kurso, kiu estos regule organizata ĉiusabate ĝis sia fino.

Ĉe la fino de la kurso, la studentoj ricevos oficialan atestilon de la kolegio. Ni esperas, ke ĉi tiu kurso helpos pligrandigi la nombron de Esperanto-parolantoj en nia komunumo. Notinde, el la 50 partoprenantoj, preskaŭ ĉiuj estas malpli ol 25-jaraj, kio reflektas la kreskantan intereson de la junularo pri la lingvo.

Unuafoje en la historio de la Esperanto-movado en Nepalo, oficiala Esperanto-kurso estas organizita en kolegio. La kurso estas senpaga, kaj la instrumaterialoj estas subvenciitaj de la kolegio mem. Ni elkore dankas la ĉefan administranton, S-ron Nhuchhe Lal Maharjan, pro la pretigo de la instrumaterialoj. Ni ankaŭ esprimas sinceran dankon al la asistantaj geprofesoroj Lekha Nath Ghimire, Govinda Katwal, Sabitri Dhakal (ĉefo de la Angla Departemento) kaj Rudra Bhattarai pro ilia valora subteno kaj aktiva partopreno en ĉi tiu grava projekto.

Koran dankon al la tuta familio de Kotesar Multfaka Kolegio pro ilia sindediĉo kaj engaĝiĝo al la disvastigo de Esperanto.






## Aperis la decembra numero de la revuo *Esperanto*

### La enhavlisto de la decembra numero:


243 | Sepdek jarojn post Montevideo. Unesko en 1954 rekonis la meritojn de Esperanto

244 | Unesko: Sukceso de milionoj!

245 | Amadou Mahtar M'Bow

246 | Konversacio kun Duncan Charters

250 | Esperanto en universitatoj: Esperanto kaj edukado al la paco en Metodo Montessori. Dua parto

252 | Tintilo kamela sonadas sur vojo vortplena. Pri la internaj sentoj en starigo de la reta vortarego

253 | Landa agado: Fizika klaso en Burundo

254 | Bonaj, efikaj spuroj de la 109-a UK en Afriko

255 | Eventoj: Cigna kanto de Arkoneso

256 | Eventoj | Esperanto en universitatoj: Junajn interpretistojn en Mastriĥto inspiras Esperanto

257 | Fake, Science kaj Profesie tra la mondo: IKU reokazos virtuale dum la VK. AIS invitas proponojn por IVU-16 kaj SUS-41

258 | Esperanto en universitatoj: Studentoj kaj instruistoj adiaŭas Interlingvistikajn Studojn en Poznań

259 | Rete: Libro de Etsuo Miyoshi senkoste rete disponebla en Esperanto

260 | Eventoj: BET-59 en Litovio


261 | Laste Aperis

262 | Indekso-2024

263 | UEA: Elekto de komitatanoj B

# La 1-a Virtuala Kongreso en 2020. Ĉu vi memoras kiel tio okazis?

Dum pandemio en 2020, sub gvido de UEA, esperantistoj organizis Mondafest' kaj la 1-an Virtualan Kongreson! UEAViva konservis la impresojn por vi!
(Re)spektu kaj reĝuu plurajn registritajn programerojn de la 1-a VK, kaj ne forgesu ŝati kaj dividi la filmetojn en viaj sociaj retoj:
https://mallonge.net/1hk





Sekvu novaĵojn kaj partoprenu diskutojn pri la Virtuala Kongreso en Telegram-grupo:

https://vk.telegramo.org

Vi povas esti aŭtoro de *La Flamo de Esperanto*!
Por kontribui, skribu al la redakcio

revuo.esperanto@gmail.com




## Speciala Oferto!

Okaze de la 100-a datreveno (6-a de novembro) de la naskiĝo de William Auld (mortinta en 2006), dum la tuta novembro ni ofertas lian *Pajleroj kaj stoploj* kun triona rabato sendepende de la mendata kvanto.
Mendu ĉe: https://mallonge.net/1hn